

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang



Nr. 4 April 1953

For la timon! - Ekzameniĝu!

Oni nuntempe ne povas aserti, ke ni troviĝas en tre floranta epoko de nia movado; almenaŭ ĉi tie en Germanio ni estas — sincere dirite — en stato ... ni esprimu nin kiel eble plej singarde ... modesta. La disvastigado de nia lingvo kaj ideo ŝajnas kuŝi ĉefe sur la ŝultroj de la unuopaj grupoj, t. e. ties pli-malpli fervoraj anoj. Grandstila propagando de supre ne estas sentebla. Ne estas sufiĉa konsolo, kiam oni rigardas aliajn kulturajn kaj idealcelajn movadojn kaj ankaŭ tie povas kaj eĉ devas konstati certan stagnadon. La konkludo do nur povas esti, ke io nedifinebla, ia ŝajne nekaptibla faktoro, eble iu mikrobo aŭ bacilo nefavora al ideala celado, enmiksiĝis en nian atmosferon, en nian vivon.

Nu, ni scias, ke ankaŭ epidemioj pasas. Ni do ne tuj malesperu; certe venos pli bonaj tempoj kaj okazoj, kaj tiam nia movado ree ekfloros ankaŭ ĉe ni. Ĝi nepre ne pereos, ĉar pereu ĝi jam ne povas.

Sed la demando estas, kion ni, la simplaj gesamideanoj, faru dum tia periodo de stagnado. Aŭ ĉu ni neniam faru? Ŝajnas, ke multaj al tio inklinas pensante, ke tiu ne pekas, kiu nenion faras. Nu, tia pensado ne konvenas, eĉ ne decas al bona Zamenhofano, kiu ja spertis el la vivo de nia majstro, ke granda ideo kaj afero ne kreskas per simpla atendado aŭ, kiel ni diras Germane: per metado de la manoj sur la femurojn. Se ni ne povas efektiviĝi heroaĵojn, grandiozaĵojn — kaj kiu postulas tiajn de ni? — ni faru ion, kio utilos al ni kaj al nia movado, eĉ se ni ne tuj rimarkas tion. Guste en tempo de ekstera stagnado konvenas tion aranĝi; sed fine mi diru, ĉu ne? kio ĝi estas. La plej simpla afero: ni iru kaj anoncu nin al Esperanta ekzameno. Ho, mi nun bone povas imagi, ke tiu kaj tiu faras seniluziigitan mienon. Ekzameno? Kaj tion oni rekomendas al ni per tiom da antaŭparolaj vortoj?

Mi petas, ne juĝu malbone pri tio, kion vi ankoraŭ ne bone esploris. Ni volas nur iomete tuŝi la avantagojn, kiuj nepre ekestos, se multaj esperantistoj akiros ekzamen-diplomon. Unue, por fari bonan ekzamenon, oni devas nepre iom studi antaŭe. Tio rezultigas konsekvence multe pli bonan konon kaj scion de nia lingvo, de ĝia historio kaj ĝia literaturo. Due, oni povus en la grupoj fondi cirklojn da ekzamenotoj, kiuj kune preparus sin: do gajno por la grupa vivo. Trie, esperantisto, kiu pruvis sian konon antaŭ komisiono kaj ricevis sian diplomon, estas multe pli valora por la propagando, ĉar li mem estas



Foto: M. Porsche, Fieberbrunn

Zamenhof kaj la infanoj

Cu tio ne estas bela bildo ... tiuj ĉi du freŝaj ĉarmaj geknaboj ĉe la monumento de nia Majstro? Li, skulptita de profunde sentanta artisto en marmoro, ŝajnas ŝvebi jam en altaj sferoj, for de la tera pezeco, jam vidante alian landon, alian teron, kie regas harmonio, kie la homoj en konsento jam formas grandan rondon familian.

Intertempe sur la Tero ankaŭ la junularo, eĉ la knabaro, ekprenis la standardon kun la verda stelo. Ili alviciĝas al la aro de la pacaj batalantoj, kaj ni konfesas kun sekreta fiero: Tiu junularo estas nia espero.

La ĉi-supra bildo de Wörgl estu al ĉiuj geesperantistetoj en la tuta mondo forta instigo kaj vigliga inspiro: ni volas imiti tiun ĉarman paron, ankaŭ ni volas nin starigi, almenaŭ spirite, al la piedoj de nia Majstro kaj sub lian protekton! Ni volas juri al li fidele daŭrigi lian grandiozan laboron.

ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos!

LINGVO, LANGO, ŜIBOLETO

Babilajo de Max Butin

En Sudafriko indiĝenaj-nigrulaj triboj proteste ribelas kontraŭ la despotismo de blankhaŭta ŝtatestro kiu, flankelasantе la principojn de homaj rajtoj, skurge svingas la vipon super la kapoj de kompartindaj individuoj, kvazaŭ ili estus bovinoj. — Bovino! Jen la gvidvorto, iniciatanta la temon de la babilajo. Aliaj okupu sin pri politikaj aferoj!

Bovino estas tre utila mamulo, produktanta en sia interna laktofabriko nemalhaveblan nektaron porbestan kaj porhoman. Neniu ĝenas aŭ ŝokas la nomo de l' dukornulino. Tamen povas okazi, ke...

Ce la zulu-kafroj ekzistas kutimo, kiu rilatas ofte konstateblan malamikecon inter bopatrino kaj bofilino. La edziniginta juna virino zorgeme evitas apliki vorton, samsonan je nomo el la edza familio aŭ eĉ nur similan al ĝi. Tiu-kaze ŝi elektas alian. Eble ŝi havas bofraton kun la nomo Unkomo. Tiu nomo memorigas al la vorto „inkomo“, signifanta bovinon en la Zulu-lingvo. Pro tio ŝi ne plu uzas tiun vorton; ĝi ne plu ekzistas por ŝi, kaj ŝi inventas novan esprimon por „bovino“.

Ni renkontas tiun intencan ekstermon ankaŭ aliloke, ekz. en Hindujo, sur insuloj de Oceanio, ĉe indianoj ktp., kiam homo mortis. Oni timas la spiriton de l' mortinto kredante, ke ĝi aperos aŭ iel malutilos ĉe elparolo de la nomo de l' forpasinto. Tiu naturpopola kutimo transiris eĉ al kulturpopoloj: Grekoj ne kuraĝis elparoli la nomon de Hadeso, kaj hebreoj ne tiun de Dio. Kiel ni modernuloj kondutas? Kiu ne avertas

„pentri la diablon sur muro“ (Z)! Sed ne nur timo, respekto, malamo aŭ superstiĉo devigas „forgesi“ vorton. En la „Proverbaro“ de d-ro Zamenhof ni legas: „En dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu!“ Kiom da esprimoj estas forgesendaj en Anglujo kiuj ŝokus nejunan aŭdantinton, kiom da eŭfemismoj aplikendaj! Kiu riskus konversacii pri gamboj aŭ femuroj virinaj aŭ pri kalsonoj kaj subjupoj en ĉesto de „ladies“?

Per kelkaj vortoj ni tuŝis la parolevitandan, do la neelparoleblan en metafora senco. Fakte ekzistas vortoj kaj sonoj apenaŭ elparoleblaj de gentoj, kies parolorganoj ne estas adaptitaj al ĉioamplaksa sonformado. Tamen tiu fakto pli kaj pli forigas sekve de tio, ke la nuntempa mondtrafiko liberigis certgrade gentojn kaj tribojn el ilia izoleco. Ilia lango

„modifiĝis“ laŭ la postuloj de l' cirkonstancoj. — „Vasta“ estas nocio de relativaĵo, do io relativa kaj dependa de homa koncepto. (Mi parolis detale pri nocioj en mia disertajo „Lingvo kaj Homo“.) Tian relativecon pravas ajutaviadiloj (Düsenflugzeuge) transflugantaj la „vastan“ mondon, nian terglobon, en preskaŭ neimageble mallonga tempo. Ankaŭ la nocio de l' tempo estas relativaĵo. La terglobo „malgrandiĝis“ kaj la langoj t. e. la langaj kapabloj universaligis: alie

cernaj gepatroj, kiujn la unua „Maŭ-Maŭ“ de l' etulo entuziasmigas. — Kia mirindaĵo! — Oni ne plu memoras la teruran „Maŭ-Maŭ“-movadon en Afriko, pri kiu oni legis abomenindaĵojn kaj emociajn raportojn en la ĵurnalaro. Du silabetoj nur, sed kia diferenco de l' signifo! Ankaŭ en vortoj kaj sonoj kaŝiĝas relativeco.

Ekzistas popoloj, eĉ altkulturitaj, kiuj pli aŭ malpli balbutas, kiam ili paŝas sur tereno lingva, nepropria al la denaska kaj al ili fremda. Ni

memorigu pri la esploristo Cook, kiun la indiĝenoj de Tahiti, kie li albordegis, nomis Tuti. Misiistoj raportas, ke la kafroj transformas „apostolon“ en „umposile“ kaj la anglan vorton „priest“ (sacerdoto) en „umperisile“. Simile procedas la ĉinoj, kiujn misiistoj instruas pri Kristo, kiu fariĝas „Ki-li-si-tu“ en ilia buŝo. Ili ne kutimas paroli du konsonantojn sinsekve kaj enŝovas helpan vokalon. En ilia lingvo mankas la sono r, kiun oni forigas el fremdaj vortoj aŭ anstataŭigas per l. Inverse la antikvaj persoj ne uzis la literon l, kiun ili en radikoj nepersdevenaj aliigis en r. Pro tio ni diras „pipro“ kaj ne „pipro“, kiel ni devus diri, ĉar la vortdeveno estas sanskrita kaj ne latina. (latine: piper, greke: piperi.) Pipro estas unu el la plej malnovaj produktoj el Hindujo, kiun ni dankas al la persoj.

Ni vidis, ke origine sona universaleco ne ekzistas kaj ĝis nun ne ekzistas. Kiu perfekte parole kopias la arabajn guturalojn (velarajn) kaj kiu la klakmaĉan sonon de hotentota lingvo? Kompreneble ni esceptu profesiajn lingvistojn kaj multajn aliajn spertulojn. Sakso skribas p, sed elparolas ĝin b. Mi mem, aŭdis (dum la Esperanto-Kongreso en Dresden 1908): Ni nun iru al la boŝto kaj boste ni manĉu (manĝu) banon kaj bomojn. Por italo la franca „Monsieur“ estas „monsu“. Rusoj konas nur „Gete“ aŭ „Getje“ anstataŭ „Goethe“, ĉar la sono ö (ekz. en germana, dana, sveda, finna kaj hungara lingvoj) estas al ili nekonata. Same ili prononcas „Geine“ (Heine) kaj „Gamburg“ aŭ „Hamburg“ (Hamburg) pro manko de spirata h en ilia lingvo. La lango de neslavo preskaŭ rompiĝas, provante korekte elparoli la rusan aŭ polan t (la pola l kun streketo tra ĝi) kaj provante venki en la batalo kontraŭ konsonanta amasigo (c. z. s. rz. sz. cz ktp.). Nur nepolaj lingvo-virtuozoj senriske jongladas per la konsonantaj diabletoj.

Zur Erinnerung an den Schöpfer
der Esperantosprache, Dr. L. L. Zamenhof,
zum 17. April

ZU FRUH

Zu früh ist er
aus dieser Welt geschieden,
doch das, was wir
durch ihn geschaffen sehn,
sein Werk im Dienst
für Freundschaft und für Frieden,
wird weiterleben und nicht untergehn.
Kommt, schließt euch an
und strebt auf gleichen Wegen
dem so beglückend schönen Ziel entgegen.

Tro frue iris li de nia tero,
sed kion tiu geniulo kreis
por nia mondo, tio ne pereis
kaj ne pereos.
Portu kun fiero
la signon de l' esper',
la verdan stelon,
kaj sekvu same nian gloran celon.

Karl Vanselow

Esperanto nun ne estus proprajo de l' homaro, skriba kaj — tio tre gravas — ankaŭ buŝa. Ne plu okazas, ke ekz. anglo prononcas Esperantajn vortojn laŭ angla fonetiko. Siatempe nek angloj nek italoj kapablis korekte elparoli la vorton Volapük. La britoj diris Volapök kaj la italoj Volapuke. Tiu epoko pasis, kaj ni trovas tiajn kuriozaĵojn nur en la „kesto de l' forgeso“.

Kelkfoje la malfacileco en la prononcado estas nur ŝajna. Vidante slavajn vortojn kiel ekz. „srb“ aŭ „kri“ (talpo), neslavo skuas la kapon: li ne scias, ke parolante oni enŝovas la vokalon e, do serb, kert. Nu, ni ankaŭ povus skribi „srboj“, ĉar fakte la r formas la silabon; ĝi funkcias ĉi tie kiel vokalo kaj ne kiel konsonanto.

Ciu homo devas lerni paroli. Beban lingvon komprenas nur la kon-

Batalo kun po

De Hans Wingen
Köln

(Fino)

Gis nun ni ekkonis jenajn signifojn de po:

- (A) Po kvar knaboj ricevis tri pomojn (= ĉiu kvaro da knaboj ricevis...; „normala” po A; germane: je)
- (A') Li donis al ili po du pomojn (= ...al ĉiu el ili du pomojn; „resenda” po A; germane: je)
- (B) Li fumas cigarojn po 20 pfenigoj (germane: zu, à)
- (C) rapideco de 80 km po horo (aŭ: pohore; germane: je, sed ankaŭ aliaj prepozicioj estas uzataj, laŭ la kazo: in der Stunde, auf den Quadratentimeter, pro Kopf ktp.). — Ni ĝuste okupas nin pri la pruvo, ke tiu senco C ne estas identa kun la senco A aŭ B.

Preseraro: paĝo 26, unua kolono, lasta alineajo: ... ne ĉiam estas klare, kien ĝi resendas.

Do ankaŭ la esprimo „80 km po horo” (sen la vorto „en”) devas esti sensencaĵo, ankaŭ se oni allasas la sencan prepozicion (B) por la vorto po: ĉar tiun prepozicion sencan oni povas ja dismeti en „en + po (A)”.

Kompreneble la esprimo C ankaŭ ne estas klarigebla per la signifo A de po; kontraŭe, se oni volas uzi po A, oni devas ĝin esprimi jene: „po 80 km en (ĉiu) horo”; do la po staras antaŭ „80 km”, ne antaŭ „horo”!

Do laŭ la signifoj, kiujn po havas en PV, la esprimo C ne estas pravigebla. Ankaŭ Z. rekte malaprobis ĝin (L. n-ro 72). Same nepravigeblaj estas pluraj el la vortkunmetoj en PV sub II (de popeca ĝis ponumera, inkluzive de tiuj du) ⁹.

Kaj tamen! Ili estas ja uzataj. Ne gravas, ke la uzantoj tute ne konscias, ke tiu senco de po estas alia ol A kaj B; ke eĉ PV diras sub po II (kunmetaĵoj): „... havanta la saman disdividan kaj ripetitan signifon” (kiel antaŭe), dum ke pluraj ekzemploj sekvantaj havas signifon fakte alian: posekunda rapideco ja enhavas po en la senco C! — Ĉiukaze po estas uzata en la senco C, ĉu nekonscie aŭ ne: tion oni devas konsideri. Cetere, ĝi estas uzata en tiu senco eĉ en la Enciklopedia Vortaro de Wüster, kaj rilate tiun verkon verŝajne ja neniu volas paroli pri apliko nekonscia. Po mem tie ne estas trovebla, ĉar la vortaro bedaŭrindege eliris nur ĝis la litero K. Sed en la aperintaj partoj oni trovas ekzemplojn laŭ nia modelo C: kilogramo po kvadrata centimetro, popeca (pago) = Stücklohn k.a.; kaj tiujn ekzemplojn la vortaro ne malaprobas (por indiki tion ekzistas specialaj signoj). En la Maŝinfaka Vortaro de la sama aŭtoro: premo po unuo de arco, helicerroj po colo k. a.

Uzata tiu senco de po do estas, kvankam ĝi ne estas registrita en PV. Ĉu oni do alprenu ĝin ĝenerale? Ke mi ne sentas min aŭtoritata, mi jam diris; sed se oni demandas min pri mia persona opinio: mi ne estas tre favora al akceptado de po C. En

⁹ La malkorekteco ne estas tute certa por tiuj vortoj, kiuj en PV sub II staras izolitaj; ekz-e pohore estas tute korekta en jena frazo: la volontulo laboras en nia fabriko pohore (= po horon aŭ po horojn, t. e.: ĉiufoje nur horon resp. horojn). Sed tiuj kombinaĵoj de po + mezurunuo staras en PV ĉiuj kune; tial oni devas forte supozi, ke po en ili havu la signifon C! — Klarigi ekz-e posemajne per „en po unu semajno” (Göhl!) estas neeble, se po havu la sencan A kaj posemajne signifon: „en ĉiu semajno”; tion ni vidis supre ĉe la traktado de la esprimo C.

la germana lingvo, fakte, je havas ja la samajn signifojn kiel po A kaj C: km je Stunde; je Kind wurden 2 Äpfel ausgegeben (ankaŭ tio estas ekzemplo por C! Germana esperantisto senhezite tradukus ĝin per „po infano estis disdonataj du pomoj”). En la franca lingvo „à” havas la sencan de po B kaj ofte ankaŭ po C: deux cigares à 20 fr (B); 50 km à l'heure (C). Sed po C ne ĉiam estas esprimebla franclingve per à, ekz-e oni devus diri: „à chaque (= ĉiu!) enfant on a donné 2 pommes”. Fine, la angla lingvo esprimas la signifojn A, B, C de po per tre malsamaj kaj variaj metodoj: por „60 mejloj po horo” oni hodiaŭ trovas plej ofte „60 miles per hour”. Pri aliaj lingvoj eble povas raportiti kelkaj fakuloj. — Ŝajnas al mi dube, ĉu tiuj diversaj metodoj en naciaj lingvoj apogas la signifon C de po. — Plue oni konsideru: se oni atribuas al po ankaŭ la signifon C, oni povas traduki la frazon „die Zeitung kostet 5,20 DM den Monat” (oder: je Monat) per po A jene: ... kostas po 5,20 markojn en monato; sed per po C jene: ... kostas 5,20 markojn po monato. Tio ŝajnas al mi tro konfuza, ol ke oni povus ĝin akcepti ¹⁰. — Resume ŝajnas al mi, ke la sencoj A kaj B de po kaŭzas jam sufiĉe da bruoj; ĝi ne malpliigos, se oni donos al po krome la signifon C.

Cio ĉi estas facile evitebla, se oni diras laŭlogike kaj laŭ la rekomendo de Z.: „kilometroj en horo, kilogramoj sur kvadrata centimetro” ktp. Aŭ, por unueigi la aferon, oni povus konsideri, ke tiuj esprimoj estas matematikaj kaj skribataj mallonge: km/h, kg/qcm. Tiun signifon / oni ja prononcas „divitite per” en ĉiuj kazoj. Tio estus unueca solvo, sed iom longa. Ĉu oni ne povus mallongigi tiun esprimon al nura „per” kaj prononci ekz-e 8:4=2 „ok per kvar estas du”? Se oni akceptus tiun proponon, oni povus legi unuece: kilometroj per horo, kilogramoj per kvadrata centimetro ktp. Iun mallongan esprimon por la dividado oni ja sen tio bezonas, almenaŭ en matematikaj kaj natursciencaj rondoj. Wüster indikas sub „dividi”, ke oni prononcas /: „sur” (ok sur kvar estas du); sed mi neniam aŭdis tion; verŝajne ĉar oni en la normala grupa vivo neniam divi-

¹⁰ Malgranda ebleco de miskompreno ekzistas ankaŭ ĉe la transkalkulado al aliaj unuoj: „10 km po horo estas la sama kiel 10 000 m po 60 minutoj”; la duan po oni eble povus interpreti kvazaŭ ĝi estus po B kaj kvazaŭ oni nun devus multipliki (anstataŭ dividi!).

das, sed nur (maksimume) adicias (nome grupkotizojn). Ĉiukaze, la uzado de „sur” por tiu celo ne ekradikas, kaj la vojo estas libera por proponoj; pli ol propono mia supra instigo ne volas esti. En pli malfacilaj kazoj ankaŭ ĝi facile fariĝas konfuza: je Kind wurden zwei Äpfel ausgegeben = per infano... — neeble! (Sed oni ankaŭ devas demandi sin, ĉu „po” en tiu kazo efektive taŭgas!) — La ĉefajo estas, ke oni vidas la rifojn de la diversaj esprimmanieroj kaj tiel povas pripensi antaŭ decidiĝo.

Kompreneble ĉiu nun diros al si: Oni ja ne povas prezenti la suprajn pripensojn al la lernanto, precipe ne ĉe tiel relative neofta vorto. Kiujn regulojn oni do donu por la praktika uzado de po? Oni miros: ili estas pli facilaj ol oni atendas, almenaŭ por germanoj. Ĉar oni, kiel dirite, povas havi diversajn starpunktojn pri la adverbeco aŭ prepozicieco de po A, kaj pri la uzado de po C, mi ĉi tie donos la regulojn laŭ mia starpunkto, kiaj ili estas formulitaj en la libro „Post la kurso” (paĝo 77):

Prepozicio po:

po = 1. deutsches je (vor Zahlwörtern) po du lernantoj uzis unu libron. Oni donis al la infanoj po 5 pomoj. Antaŭ po du seĝoj staris tablo. — pogrande im großen, en gros; pomalgrande = en detail; pogute tropfenweise.

2. à, zu, das Stück: Li aĉetis 5 cigaredojn po 10 pfenigoj. Si ricevis 8 lecionojn po 3 markoj.

Anmerkung: Ausdrücke wie „je Stunde, je Pfund, je Stück“ bedeuten eigentlich „in der Stunde, für das Pfund“ usw. Man übersetze daher „60 km je Stunde“ sinnrichtig durch „60 kilometroj en (ĉiu) horo“. Si pagis 50 pfenigojn por (ĉiu) funto.

(Aldono: Ĉi tien apartenas ankaŭ la frazo „je Kind wurden zwei Äpfel ausgegeben”, ĉar tio signifas: für jedes Kind, auf das Kind ... do: por ĉiu infano estis disdonataj du pomoj.)

Kaj la kazojn plursencajn? Oni ne traktu ilin speciale; gramatike ili ja estas korektaj! Krome ili estas tre, tre maloftaj; kaj ankaŭ en multaj aliaj punktoj oni devas lasi la ekkonan de plursencaj kazoj al la uzanto mem de la lingvo.

Danaj karavanoj en Germanujo

27. 6.—1. 7. 1955 dana karavano de s-ro Friis vizitos Harzmontaron kaj loĝos en naturamika domo en Bündheim-Harzburg Gvidanto H. Müller, Lehrte. Kiuj germanaj esperantistoj vizitos ilin?

2. 7. — 10. 7. dana komerca lernejo loĝas en la sama hejmo. Ankaŭ ĉi-foje estos gvidanto H. Müller, Lehrte.

27. 7.—4. 8. 1955 alia dana karavano de s-ro Friis sub gvidado de Müller, Lehrte, vizitos Rhein-, Mosel- kaj Nahe-valojn.

Ĉiuj germanaj esperantistoj estas invitataj viziti la internacian feriosemajnon en Helsingör, norde de Kopenhago, 18. 7. — 25. 7. 1955.

Raporto de Germana Esperanto-Junularo pri la laborperiodo 1952/53

La laborperiodo 1952/53 de Germana Esperanto-Junularo komenciĝis ŝajne sub malbona stelo, post kiam la jarkunveno en Ratingen estis malbone vizitita kaj ne sukcesis elekti novan estraron kaj aranĝi diversajn aliajn gravajn aferojn. Tamen montriĝis poste ke la estraro, iom hazarde kunmetita per referendumo, bone kun- kaj eklaboris kaj entrepreneme efektivigis diversajn gravajn planojn. Kiel celon ni antaŭmetis al ni sisteme la internan konstruadon kaj plifortigon de GEJ, post kiam dum la antaŭa periodo Michel Schmidt estis ĉefe zorginta pri la ekstera organizo, pri la ekkontakto kaj konatigo de GEJ kun oficialaj instancoj.

Kiaj unuopaj laboroj do nun estis faritaj dum la pasinta jaro? Mi citu ilin koncize: Orienthelpo — Ortenberg — Kantaro — Interŝanĝservo — Lingva Konkurso — Diskutadoj en „Esperanto-Post“ — Disaŭdigoj en radio — Intertraktadoj kun la Germana Junulgasteja Asocio.

Pleje, laŭ mia opinio, GEJ rajtas fieri pri la efiko de la ekkontakto kaj de la pakajsendado al niaj orientgermanaj junaj gekamaradoj okaze de Kristnasko; kvankam tio eble unuavide ne ŝajnas esti tasko de GEJ, mi tamen kredas, ke ankaŭ tio apartenas al nia laborkampo kaj estas ĉefe nia homa devo; ĉar antaŭ ol ni volas plekti interligojn al fremdaj popoloj, ni faru la saman en la propra popolo. La rezulto pravigis nin: La respondoj ricevitaj estis kelkfoje vere kortuŝaj kaj la ĝojo nepriskribeble granda pri la fakto, ke ni ne tute forgesis ilin malantaŭ la fera kurteno; tio montriĝis en preskaŭ ĉiu letero. Oni rimarkis, ke niaj sveltzonaj gekamaradoj misis kaj sopiris al la spirita kontakto kun ni. Ĉi tiu akciono okaze de Kristnasko ne restu unusola; ni tiel daŭrigu la tutan jaron. Eble troviĝos kelkaj helpemaj grupoj, kiuj travigis kvazaŭ „baptopatrecon“ pri po unu junul(in)o kaj spirite kaj materie iom subtenos lin. La grupo Friedberg tiurilate jam donis bonan ekzemplon.

En Ortenberg GEJ aranĝis inter la 26. 12. 52 — 1. 1. 53 internacian labor-konferencon por esperantistaj gejunuloj, kiun ĉeestis partoprenantoj el Francujo, Svislando, Italujo kaj Germanujo. La celo estis peri al niaj membroj ioman scion ankaŭ pri ŝtatecivitanaĵ problemoj. Okazis referaĵoj kaj diskutoj pri: „La svisa demokratio kaj la partopreno de la svisa civitano al la komunuma kaj ŝtata vivo“ (dro Bauer, redaktoro ĉe radio Bern); „Ekonomiaĵ kaj socialaj problemoj de eŭropa unuigo“; „Helpo al la junularo kaj la batalo kontraŭ filiteraturo kaj -filmoj“; „Francaj lernejaĵ sistemoj kaj instruaj metodoj“; „Esperanto kaj ĝia ebla uzado en eŭropaj instancoj, precipe rilate al eventuala eŭropa armeo“. Detalan raporton pri tiu konferenco, kiu trovis tre bonan eĥon en la publiko, ni sendis krom al nia membraro al ĉiuj oficialaj instancoj en Germanujo, kiuj okupiĝas pri junularaj aferoj, al la radiostacioj ktp. I. a. respondis la hesslanda ministro por internaj aferoj: „...daß es sich bei der Esperantobewegung um ein dringliches Anliegen handelt, ist mir angesichts des Zieles einer europäischen Einigung und einer echten Völkerverständigung seit längerer Zeit klar. Soweit es in meinen

Kräften steht, werde ich gerne die Anliegen der DEJ fördern. Dankbar wäre ich Ihnen, wenn Sie mir gelegentlich wieder solche Berichte über die Tätigkeit der DEJ zusenden würden...“. Salutleteroj alvenis de kelkaj esperantistaj politikistoj, i. a. de la nederlanda ĉefministro, sro Drees. Estas dezirinde, ke GEJ estonte pli ofte aranĝu similajn kunvenojn, kiuj pruvas al la publiko la taŭgecon de Esperanto por la diversaj kampoj, instigas la gejunulojn al konversacio esperantlingva ankaŭ pri neĉiutagaĵoj, tiel plialtigante la lingvan nivelon, kaj peras al ili de fakuloj scion pri aktualaj problemoj de la vivo.

Kun la raporto pri Ortenburg ni kunligis lingvan konkurson, kies tasko konsistis el la esperanta traduko de du el la nomitaj referaĵoj laŭ la germana raporto. Verkante ĉi tiun laborresumon mi ankoraŭ nenion povas diri pri la konkurserzulto.

La redakcio de „Esperanto-Post“ disponigis al GEJ en ĉiu numero unu paĝon kaj pli, kiun ni rezervis al la opiniesprimado de la membraro. Farigis bona komenco, sed por la daŭro necesas pli vigla kunlaboro de la membroj. Simile estas rilate al nia perradia propagando. Ni sukcesis ĉe Südwestfunk havigi al ni regule la eblecon disaŭdigi dum la semajna horo destinita por la junularo manuskriptojn de ni; GEJ estas reprezentata en la komitato, kiu prilaboras tiujn elsendojn; sed ree mankas al ni la kunlaboro de „eksterfreiburganoj“, por ke ni povu eluzi la tutan eblecon prezentatan al ni.

Per la eldono de ampleksa presita kantaro esperantista, enhavanta eksterlandajn kaj ĉefe germanajn folklorajn kaj junularkantojn ni intencas plenumi ofte esprimitan deziron de la germanaj, ne nur junaj, esperantistoj. La manuskripto iris komence de ĉi tiu jaro al la lingva komitato de GEA por prijuĝo, kaj ni esperas, ke la kantaro aperu ankoraŭ antaŭ nia pentekosta kongreso.

Same malnova projekto, kiu nun ekrealiĝas, estas la junulara feria interŝanĝo de familio al familio kun eksterlando; provizore ni aranĝas la servon kun Francio kaj Svislando, sed kredble baldaŭ ankaŭ Danlando, Italio kaj Jugoslavio partoprenos. Por GEJ transprenis la organizadon de la interŝanĝo la junulargrupo Konstanz, p. a. Irmtraud Brandt, Konstanz, Wollmatinger Str. 61 (korespondante kun ŝi bv. nepre aldoni duoblan reafrankon!)

La internacia junulgasteja movado dum sia lasta konferenco rekomendis al la landaj asocioj, en la junulgastejoj publiki ankaŭ fremdlingvaj domregulaĵojn; momente ni interrilatas kun la germana junulgasteja asocio pro la publiko ankaŭ de esperanta teksto; deĉido ankoraŭ ne okazis. Cetero mi tiuokaze volas refoje atentigi, ke GEJ estas kolektiva membro de DJH kaj disponas pri ties legitimiloj por junulargrupvidantoj, kio tre plimalkarigas la tranoktadon de niaj grupoj en junulgastejo.

Preparita, sed ankoraŭ ne realigita estas informservo pri la tutmonda esperantista junularvivo por la germana junulargazetaro kaj la radiostacioj. Similo validas por la noveladono de nia varbfolio „Wir rufen Euch, Jungen und Mädchen in Deutschland.“

Kiel lastan grandan entreprenon dum

nia periodo ni post Pasko preparos kaj dissendos detalan germanlingvan raporton, enhavantan la celojn, historion kaj laboron de GEJ, la adresojn de niaj pli grandaj grupoj ks. Tiun raporton ricevos informcele ĉiuj junularaj gazetoj germanaj, la radiostacioj kaj la germanaj ministerioj por internaj kaj edukaj aferoj, plue aliaj instancoj interesiĝantaj pri junularaj problemoj.

Kritike mi devas menci, ke la kontakto de la estraro kun la grupoj ne estis tiel malvasta, kiel ni deziris. En kelkaj grupoj laŭ nia impresio mankas iom freŝa vento; ili kredas: supre tro-nas la estraro, tiu faru ĉion. Tamen la membraro de GEJ malrapide, sed konstante kresketis dum la pasinta laborperiodo. Kiel niajn du plej aktivajn junulargrupojn mi volas honore menci tiujn de Berlin kaj Herford. Estus rekomendinde, ke ili ĉi-jare disponigus el siaj vicoj la membrojn por la nova estraro de GEJ.

Plena malsukceso estis pro mankanta kunlaboro de kelkaj grupoj niaj klopodoj, starigi en la unuopaj landoj germanaj landajn ligojn de GEJ, kiuj kontaktu kaj kunlaboru kun la tieaj landaj junularparlamentoj ktp. Kiel bedaŭrindan faktoron al la pasinta jaro, kiu probable ankoraŭ okupigos nian jarkunvenon, mi devas fine menci la nelojalan sintenadon al GEJ fare de la arangintoj de la tendaro en Ratingen kaj de SAT-junulfako, okaze de la postaj finlaboroj pri Ratingen.

Tasko de nia ĉefkunveno en Frankfurt estos krom la kutimaj administraj aferoj la decido pri detala laborplano por la venonta jaro kaj la fikso de nia sintenado al diversaj aktualaj punktoj (kunlaboro kun diversaj instancoj, gravaj organizaj problemoj, gazeto ktp.).

Fine mi ĉi-loke deziras esprimi mian dankon pro la helpemo, kiun ni trovis flanke de diversaj personoj kaj instancoj: al dro S. Ziegler kaj al S.-Zieglereldonejo, al la redakcio de „Esperanto-Post“ kaj al „Limburger Vereinsdruckerei“, al la federacia kaj la iama badena ministerioj por internaj aferoj en Bonn kaj Freiburg, al la franca kaj usona altkomisarejoj pro la diversspecaj subtenoj ricevitaj; fine ankaŭ al miaj kunlaborantoj en la estraro de GEJ, precipe al nia kasistino Annerose Adrion, kiu krom sia faka tasko plenumis ankoraŭ multajn aliajn servojn por GEJ, kaj al ĉiuj aktivaj grupoj kaj izoluloj. Daŭrigante kiel pasintjare ni malrapide, sed konstante kaj certe alproksimiĝos al la celo.


Franz Josef Scholz,
1-a prez. de GEJ, Freiburg.

Internaciaj konferencoj por Esperantistaj studentoj kaj altlernejoj en Ljubljana aŭg. 1953

Pasintsomere okazis en Schluchsee, Germanujo, la unua internacia konferenco por esperantistaj studentoj kaj altlernejoj (studentoj). Ĝi estis sukcesa, kaj nun la nova organizo „Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj“ — IFESA devone invitas al simila konferenco. Ĝi okazos en Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenujo, 1.—8. aŭg. 1953.

Jenaj temoj estos pritraktataj: Studmanieroj kaj studeblecoj ĉe diverslandaj universitatoj, kolegioj kaj altlernejoj, Studeblecoj por eksterlandaj studentoj en la diversaj landoj. Kio estas farata por ke la studado ĉe universitato k. s. ne farigu tro faka? La funkciado de esperantaj katedroj dum 1952/53 kaj Aktiveco de esperantistaj studentaj organizoj dum 1952/53. Krome okazos serio da prelegoj pri kulturaj temoj, ekskursoj, balo ktp.

Partopreno kostas 12 us. dolarojn aŭ egalvaloron, kaj interesatoj povas peti senpagan programon de IFESA, Laksegade 35, Kopenhago K., Danlando.



Trifoje akurate je la dekdua horo...

Romano de Walter Galdert

E L L A G E R M A N A T R A D U K I S F R I E D R I C H E L L E R S I E K

Dua daŭrigo

Neufeld malatentis la admonojn de sia mastrumistino kaj ne kunprenis ion por manĝi. Tio nun malagrable venĝiĝis. Li sentis sin mizerega kaj preskaŭ fariĝis marmalsana. En la stacidoma restoracio li provis plifavorigi sian stomakon per teo kaj biskvito, sed nur la dua matenmanĝo poste en la restoraci-vagono kvietigis la malbonhumorulon.

Post Aĥeno la vagonaro transveturis la belgan landlimon, kaj en Lieĝo ja estis la horo por manĝo. La interparoloj en la restoraci-vagono, kiuj ĝenerale priraktas ĉiun eblan sensencaĵon, hodiaŭ okupis sin nur pri unu temo: la misteraj okazintaĵoj en Berlino, Parizo kaj Romo. Maljuna sinjoro kun bluaj okulvitroj asertis insistege, ke la uloj, falegintaj de sur la kolonoj, estis loĝantoj de la planedo Marso. Li parolis pri la minacanta invado de la Marsanoj kaj atribuis al ili la intencon, laŭ elprovita surtera ekzemplo ekstermi la Teranojn per venengaso.

Neufeld ridetante aŭskultis ĉion kaj mem ne parolis unu vorton. Mezepoke aspektanta sinjorino ĉe lia tablo deklaris lin ruso kaj asertis ĉiam denove, ke tutcerte la Bolŝevikoj kaŭzis la terurajn okazintaĵojn.

Ion post la kvina posttagmeze la vagonaro alvenis en Parizo. Neufeld loĝigis sin en malgranda hotelo proksime de Stacio de Nordo. Ĝis la horo de l' vespermanĝo restis ankoraŭ tempo por malgranda promonado. Kien? Kompreneble al la okazintejoj de la misteraj akcidentoj.

Sur la placo de la Bastille la vendisto de ilustritaj poŝtkartoj signis per nigra farbo la lokon, sur kiun la kompatinda Lalou estis faleginta. La vendisto staris meze de densa homamaso kaj rakontis kun viglaj gestoj. Li ne forgesis eĉ unu detalon kaj per alta voĉo imitis ankaŭ la ekkrioj de la sinjorino: „Mia Dio, li falas malsupren!“ Sed tio eĉ ne estis ĉio. Li jam havis poŝtkartojn, sur kiuj estis videble, kiel la malfeliĉulo kun etenditaj brakoj falegis en la profundon. La publiko multege aĉetis ĉi tiun laboraĵon de ruza retuŝisto.

Ĉe la Ponto Reĝa estis precize la sama aktiveco. Stratkantisto estis signinta per ruĝa kreto la lokon de la ponta muro, el kiu la nekonato saltis en la riveron, kaj li kantis sentimentalajn liedon, mem poemitan kaj komponitan. Sur malagordiĝinta liuto li akompanis sian kantadon. Infanoj staris ĉirkaŭ li, kaj kiam li kantis la speciale kortuŝan refrenon, ĉiuj kunkantis.

Neufeld vespermanĝis en la Rue de Rivoli kaj post daŭrigita promonado frue enlitigis sin.

La venintan antaŭtagmezon li jam estis survoje al la polic-prefektejo, kiam li ekpensis, antaŭe viziti la vidvinon de Lalou. Tio eble povus esti tre utila. Per la Métro li veturis ĝis la stacio „Malesherbes“ en la nordokcidento de la urbo; de tie li estis post unu minuto en la Rue de Cardinet.

La kompatinda sinjorino Lalou estis pli trankvila, ol Neufeld estis supozinta. „Kia feliĉo, ke vi venas, kara amiko! Vi klarigos la sekreton kaj faros finon al la babilaĉado de la homoj kaj de la gazetoj. Mia edzo tutcerte ne propravole iris en la morton, li ne estis sinmortiganto. Iu mistera potenco kunefikis. Vi trovas la krimulojn. Imagu: la kunloĝantoj de ĉi tiu domo turnis sin al la mastro kaj postulis, ke mi eksloĝiĝu. Ili legis la kombinaĵojn de la gazetoj kaj asertas, ke mia edzo estis membro de bando de krimuloj kaj ke ĉi tiu bando devigis lin al sinmortigo. Kun la vidvino de bandito ili ne pli longe volas loĝi sub la sama tegmento. Mia Stefano — bandito!“

„Ne, sinjorino“, diris Neufeld, „via edzo ne estis bandito. Ne lasu aflikti vin per la baliladoj de la homoj. Mi faros ĉion eblan, por solvi la teruran enigmon kaj havigi al la kulpuloj la merititan punon. La Pariza polico certe jam detalege esplordemandis vin; malgraŭ tio ankaŭ mi deziras ĝeni vin per kelkaj demandoj.“

„Demandu, kara amiko, sed multon mi ne povos diri al vi.“

„Unue demandon, pri kiu bonvolu ne esti ofendita: Ĉu via edzo iam faris ion, el kio oni povus konkludi pri alieneco?“

„Precize la samon demandis min ankaŭ sinjoro Nombriil. Mi povas diri al vi nur jenon: se iu havis klaran kapon, tiu estis mia Stefano.“

„Ĉu li estis membro de iu klubo aŭ unuiĝo?“

„Neniam! Mia edzo malŝatis la klubulecon. Liaj amikoj ofte provis akiri lin por siaj unuiĝoj. Li ĉiam priridis ilin kaj rifuzis iliajn invitojn.“

„Ĉu via edzo en la daŭro de la lastpasinta jaro eble sola faris vojaĝon?“

„Jes. Antaŭ tri monatoj li estis unu semajnon en Romo. Estis malmultekosta karavan-vojaĝo. Stefano jam de longe havis la deziron, vidi Romon. Ĉi tiun fojon prezentiĝis malmultekosta okazo, sed por ni ambaŭ la vojaĝo tamen estis tro multekosta. Mi longe konsiladis al li, vojaĝi sola, ĝis kiam li fine konsentis. Li kunportis al mi belan ĉenon el vitroperloj — jen ĝi estas —, kaj por si li estis aĉetinta tre prezindan horloĝon. Sed ĉu vi opinias, ke ĉi tiu vojaĝo povus rilati al lia morto?“

„Ni homoj de la polico devas kalkuli kun ĉio kaj konsideri ĉiun eblecon. Povus ja esti, ke via edzo dum lia vojaĝo al Romo faris interkonatiĝojn. Ne, ne, mi tute ne volas diri, ke li interkonatiĝis kun sinjorinoj. Ĉu li eble rakontis al vi pri iuj homoj, kun kiuj li interrilatis dum la vojaĝo?“

„Mi vere ne povas memori pri io tia. Sed Stefano dum la vojaĝo enskribis ĉian rimarkindaĵon en sian memorlibron. La libro kompreneble estas je via dispono. Ĝi eble povas doni al vi iun klarigon.“ Sinjorino Lalou prenis el la skribotablo malgrandan libron, binditan en blua led-imitaĵo, kaj donis ĝin al Neufeld.

„Ĉu via edzo mallonge antaŭ sia morto ricevis leteron, kies enhavo ekscitis lin?“

„Ne, ankaŭ tio ne okazis. La poŝtisto venis nur tre malofte al ni. Antaŭ la morto de Stefano ni eble dum du semajnoj ne ricevis leterojn. Kaj se letero venis, ĝi estis de parenco aŭ konatulo, kaj ĝia enhavo estis tute ĉiutaga kaj sendanĝera. Stefano neniam ne montris leteron al mi. Nun vi kompreneble pensas, ke li povus esti ricevinta leterojn senditajn al kaŝadreso. Mi ne povas pruvi al vi la malon, sed mi scias, ke Stefano ne havis sekretojn antaŭ mi.“

„Vi do ne havas eĉ la plej malgrandan konjekton?“

„Mi povas diri al vi nur la samon, kion mi jam diris al inspektoro NombriL. En la lasta tempo antaŭ la morto de mia edzo mi nek vidis nek aŭdis eĉ la plej-malgravaĵon, kiu iel povus rilati al la terura okazintaĵo. Vi povas kredi mian certigon, ke ankaŭ sen polica demandado mi cerbumegis por trovi nur iometan klarecon.“

Neufeld adiaŭis sin kaj promesis reveni baldaŭ. Sur la ŝtuparo staris pluraj samdomanoj kaj interproksimigis la kapojn.

„Tiu certe estas unu el la bando“, iu flustris ekscitite, „li verŝajne minacis la sinjorinon. Oni tuj devus areŝtigi la kanajlon.“ — „Ho ne“, diris alia, „li estas policano. Mi estas spertulo pri vizaĝoj de kaptistoj.“

Inspektoro NombriL, la detektivo kun la Menjou-vizaĝo, salutis Neufeld-on kun entuziasmo: „Koregan bonvenon! Kiel statas ĉe Alex? Kion faras la Münzstraße, Wedding kaj Bülowbogen?“ Kiel kriminalisto li konis ne nur la lumflankojn de Berlino. „Nu, se ni nun duope komencas labori, ni certe sukcesos! Kiel estas eble, ke vi Berlinanoj ankoraŭ ne identigis la du mortintojn? Ni nun jam havas ankaŭ la personaĵojn de nia dua viro. Estas la antikvaĵisto Johano Borel el la Rue de Granelle. Mi ĝuste volis fari viziton al lia loĝejo. Vi certe akompanos min, ĉu ne?“

„Tre volonte. Cetere mi ĵus venis de la vidvino de l' kompatinda Lalou. La sorto ludas strange: Lalou estis bona konato de mi. Mi konatiĝis kun li en la pasinta jaro en La Bourboule.“

„Tiuokaze vi eble eksciis pli multe ol ni. Kontraŭ ni la vidvino Lalou estis tre retenema. Eĉ ne ion gravan informon ŝi povis doni al ni. Kaj en vero ŝi almenaŭ devus havi konjektojn.“

„Laŭ la impresoj, kiuj mi ricevis, ŝi efektive ne scias eĉ nur iometon. Mi parolis kun ŝi kiel amiko. Tio, kion mi aŭdis de ŝi kaj kion mi mem sciis, tamen sufiĉas al mi, por tute escepti la teorion pri sinmortigo.“

La mastrumistino de la droninta antikvaĵisto komence montris sin tre malafabla. Ŝi estis ofendita pro tio, ke oni malpligrandigis ŝian suverenecon, lasante en la loĝejo polican oficiston por gardado. Sed iom

post iom ŝi fariĝis pli parolema. „Kio okazis al mia sinjoro, vi deziras scii?“ ŝi fervore demandis. „Mi povas diri tion al vi: mia ĉefo estis membro de bando de krimuloj. Li certe malkaŝis sekretojn, kaj pro tio oni silentigis lin. Mi legis iam romanon en 'Petit Parisien' kaj en ĝi estis same. Unu membro malkaŝis sekretojn de la bando, kaj jen ili kondamnis lin al morto. Iunokte ili portis lin sur ponton, metis plumbon en liajn poŝojn, kaj poste li devis salti en la Seine-on. Sed en la romano ne estis la Ponto Reĝa, sed la Ponto de Jéna.“

„Bela romano“, diris NombriL ridetante. „Sed ĉu vi kredas, ke rilate al via ĉefo la afero estis tute la sama? Vi certe nur konjektas tion. Aŭ ĉu vi serioze opinias, ke sinjoro Borel estis membro de bando?“

„Jes ja, tion mi opinias. Mia sinjoro apartenis al bando. Mi jam ĉiam diris, ke iam venos malbona fino. Se ne estus pro la bona salajro, mi jam de longe estus forlasinta la servon en ĉi tiu domo. Nun okazis la malfeliĉaĵo, kaj mi ne havas eĉ nur unu soldon. Kiu nun dungos min? Ĉiuj konsideros min kun-kulpa.“

„Nu, nu, kiu pensus tion? Sed nun rakontu al ni tre detale, kion vi scias pri la bandita agado de via ĉefo.“

